
# FORUMO

n-ro 135
(5/2006)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

*LSG ne kunvenos 2007 en Japanio, sed ni esperas ke vi tamen iros al la UK en Jokohamo! La venonta kunveno de LSG okazos en 2008.*







Fina adiaŭo p 2

Plia raporto de la jarkunveno p 3

Gejaj rajtoj en Proksima Oriento p 3

Ekspozicio en Oslo 'Kontraŭ la naturo?' p 4

Vankuvera Diservo por beni novan edzduopon p 5

Seksumado en la islamaj landoj p 5

Beletra niĉo p 6

## L. S. G.
### Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

**Retejo:** http://lsg-esperanto.org
**Adreso, retpoŝto:** Vidu ĉe la sekretario-kasisto sube.
**Membriĝo:** Kontaktu la sekr.-kasiston.
**Kotizo:** 10 EUR/1 jaro, 25 EUR/3 jaroj.

### ESTRARO

**Prezidanto:**
Arnold VICTOR, Apartment. 1, 160 West Eleventh Street, New York City, New York 10011, Usono;
arvimide(ĉe)earthlink.net
**Sekretario-kasisto:**
Rolf, Germanio;
lasekretario(ĉe)gmx.net /
lakasisto(ĉe)gmx.de
**Estrarano pri varbado:**
Francis, Francio;
fsoghomonian(ĉe)yahoo.fr
**Estrarano:**
Torstein, Norvegio;
kvakke(ĉe)hotmail.com
**Retprizorganto:**
Randy, Usono;
randy.dean(ĉe)pobox.com

### FORUMO – membrogazeto de LSG
### N-ro 135 (5/2006)

**Provizora redaktanto:**
Andreas, Svedio.

**Kontribuoj** al la gazeto ĉiam bonvenaj: *bv sendi ilin al la sekretario, vidu adreson supre.* – La gazeto aperas ankaŭ rete kiel PDF-dosiero. Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigitaj el la reta versio.

**Ekspedo de FORUMO:** La sekretario-kasisto, vidu supre. Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto, se estas ĉeĥa adreso! La persono ne estas ligano. Ni nur forsendas la gazeton el Ĉeĥio pro la tieaj favoraj poŝttarifoj.

## Fina adiaŭo

Per ĉi tiu numero mi definitive adiaŭas la redaktantecon de Forumo. Bedaŭrinde neniu ĝis nun anoncis sian pretecon transpreni ĝin. Ĝis nova redaktanto aperos, la membroj de LSG ricevos nur la kutimajn sendaĵojn de la sekretario, kiel la adresaron de gastigantoj k.s., kaj krome la alvokon kaj tagordon por la jarkunveno ktp.

Se vi volas fariĝi redaktoro de Forumo, bv kontakti la sekretarion, vidu adreson apude.



Mi volas danki la legantojn pro la pacienco havi min kiel redaktanton, kvankam mi ne estis la ĝusta persono por la tasko. Espereble nova redaktanto povos revivigi la revuon kaj trovi pli interesan materialon por ĝi ol kion mi povis fari.

*Andreas*

## Plia raporto de la jarkunveno

*Ĉi tiu raporto devintus aperi jam en la antaŭa numero. Jen ĝi finfine estas:*

1. Unu ŝanĝo al la tagordo: Maŭro parolis pri la jenaj aferoj:

   a. Lundon vespere je la 19h30 LSG-anoj estos akceptitaj ĉe la kunsido de loka geja organizaĵo. Tiuj, kiuj volas tien promeni grupe estu antaŭ kongresejo je la 19h00.

   b. Maŭro anoncis la prezon de la busveturo (26.50 EUR) por la merkreda ekskurso kaj ke ne plu eblas aliĝi pro manko de spaco. Ĉiu pagos individue manĝon kaj eniron al muzeoj kaj monumentoj.

2. Todd (Toĉjo) akceptis esti la raportisto de la kunveno.

3. Arnold resumis la protokolon de la pasintjara kunveno en Vilno. Ne estis sugestitaj ŝanĝoj al tiu protokolo.

4. Arnold menciis, ke estos denove LSG-budo ĵaŭdon en la kongresejo.

5. Arnold anoncis, ke, pro fuŝo de UEA, ne eblas prezenti financraporton ĉi-jare.

6. Landaj raportoj:

   a. Francis estis kontaktita de franca geja televidkanalo kaj proponis eventualan televiditan debaton. Li ankaŭ sugestis, ke oni aperigu LSG-on en landaj gejaj jarlibroj.

   b. Arnold raportis pri la ELNA-kongreso okazinta pasintsemajnfine kie li prelegis pri LSG kaj ties utileco al kaŝitaj gejoj en certaj landoj kaj pri nia eldona agado. Ĉeestis ĉirkaŭ 20 homoj, kelkaj negejaj.

7. Ni decidis, ke la LSG-kotizo ne ŝanĝiĝu ĉi-jare.

8. Elektado de estraro:

   a. Arnold akceptis resti la prezidanto pro manko de interesatoj. La ceteraj estraranoj tenos siajn postenojn.

9. Francoj nun povas pagi LSG-kotizon rekte al Francis kaj usonanoj al Arnold.

10. Rezolucioj

   a. Okazis maltrafoj partopreni demonstraciojn en Latvio kaj Pollando pasintjare. Sugestitas, ke ni klopodu esti pli aktivaj en tiaj aferoj.

   b. Francis proponis, ke LSG aliĝu al ILGA. Ni akceptis proponon de Torstejn pristudi la eblecon aliĝi kaj ni decidu venontfoje.

11. LSG decidis ne kunveni venontjare en Jokohamo. Ni ja kunvenos en 2008, supozeble en Eŭropo.

12. Starado por forpasintaj LSG-anoj.

## El lsg-ano

*Kun afabla permeso de Brian en Kanado mi ofte en-Forumo-igis liajn interesajn raportojn al retlisto lsg-ano. Tiel ankaŭ tiuj sen retaliro povas legi ilin. Jen aro da ili:*

### Gejaj rajtoj en Proksima Oriento

En 2 oktobro la brita gazeto Guardian afiŝis interesan artikolon en sia reteldono pri la ekapero de lesba movado ”Aswat” (Voĉoj) en proksim-orienta Arabujo. Ĝi estas tro longa por plena traduko, sed jen konciza resumo:
Ĉiuj samseksaj rilatoj estas ankoraŭ tabuaj en tuta Arabujo kaj ĝis lastatempe ia ajn grupa organiziĝo estis neebla. Lesboj povis informiĝi unu pri la alia nur per

buŝaj disfamigoj, kaj renkontiĝoj eblis nur pere de personaj rekomendoj. Per tia disfamigo rondiris novaĵo pri porlesba perreta dissendolisto, kaj ĝuste ĉi tiel ekestis Aswat en januaro de 2003. Ĝi estas la unua funkcianta organizaĵo por arabaj lesboj en tuta Proksima Oriento. Post tri jaroj ĝi havas jam pli ol 70 membrojn en la regiono okcidente de Jordano, Gaza kaj Israelo (ties sidejo), kvankam nur ĉ. 20 povas pro pluraj kialoj ĉeesti la kunvenojn.

Unu el la ĉefaj celoj estas liveri informojn, aliloke libere haveblajn sed neniam antaŭe haveblajn per la araba lingvo, pri sekseco, kaj krei pozitivan, sendiskriminacian, neagresivan lingvaĵon pri ĝi. En 2006 oni aljuĝis al la movada proparolantino premion de internacia gej-lesba komisiono pro ŝia laboro. Post intervjuo pri ŝia poezio en 2003 de israela periodaĵo ŝia sekseco parenteze evidentiĝis, sekve al kio ŝi devis alfronti multajn personajn malfacilaĵojn flanke de araboj, ekz. frakason de aŭtofenestroj, plurfojan trapikon de pneŭoj, ricevon de minac-leteroj kaj telefon-alvokoj, perdon de posteno kiel instruistino, eĉ fotokopian diskonigadon de la artikolo tra vendejoj en ŝia propra kvartalo.

En araba socio ne nur la islamana klerikaro kondamnas samseksecon, sed ankaŭ la kristana. En Palestino estas plia politika komplikaĵo – ĉiu gejo iĝas aŭtomate suspektato de kunlaboro kun Israelo, ĉar tiu lasta foje ĉantaĝe premas ilin iĝi informantoj. Per konstrasto, en Israelo mem samseksaj rilatoj iĝis ne-kontraŭleĝaj en 1988, kaj en 1992 Israelo iĝis la sola mezorienta lando por malpermesi seksbazitan diskriminacion. Tiu kunligo de Israelo kun seksa permesemo estas ofte ekspluatata de Palestino kaj Egiptio por propagandaj celoj. Israelo estas tamen nur ŝajnparadizo por gejoj, ĉar eldiroj de konservativaj ortodoksaj judoj apenaŭ malsamas de tiuj de islamanoj, kaj eĉ okazis ke juda fanatikulo foje fizike atakis gejojn per tranĉilo. Kelkaj israelaj radikalaj gejaktivuloj vidas paralelon inter subpremo de gejoj kaj subpremo de palestinanoj. La tiuregionaj interkonektoj (sociaj, religiaj, politikaj, etnaj) estas tiel komplikaj, ke simple ne eblas trakti gejajn rajtojn kiel ion apartan – ili estas neapartigeblaj de homaj rajtoj entute.

*Brian*

Fonto: Coming out in Arabic, Brian Whitaker reports on a lesbian group's struggle for acceptance in the Middle East, lundo 2 oktobro 2006 Guardian Unlimited, http://www.guardian.co.uk/elsewhere/journalist/story/0,,1885792,00.html

## Ekspozicio en Oslo 'Kontraŭ la naturo?'

Laŭ raporto de novaĵagenturo Reuters , aperinta en vankuvera senpaga ĵurnalaĉo '24 Hours', malfermiĝis en 13 oktobro en Oslo, Norvegio, la unua en la mondo muzea ekspozicio pri samseksamo en la faŭno, kiu tuj rikoltis kondamnon fare de kelkaj kristanoj.

Jam dokumentita estas geja/lesba konduto inter ĝirafoj, pingvenoj, papagoj, skaraboj, balenoj kaj dekduoj da aliaj specioj, pro kio la universitata Naturhistoria Muzeo de Oslo konkludas, ke oni ne povas konsideri homan samseksamon 'nenatura', ĉar oni renkontas ĝin dise tra la faŭna regno. Estro Geir Soeli de la projekto 'Against Nature? (Kontraŭ la naturo?) konstatis en intervjuo kun Reuters, ke oni observis samseksamon inter

Christ Church Cathedral
Vancouver, BC | Anglican Church of Canada

*Kie oni benas samseksajn parojn (vidu artikolon sube)*

jam 1500 specioj de faŭno, kaj dokumentis ĝi en 500 da ili. La seksa apetenco[1] estas forta en ĉiuj animaloj, ĝi estas ero de la vivo kaj plezurdona. Jen eble la ĉefa kialo kondukanta al samseksemo kaj duseksemo inter la bestaro, li diris.

*Brian*

Fonto: http://www.nhm.uio.no/againstnature/index_no.html
[1]apetenco = instinkta deziro al ĉio, kiu povas kontentigi ian naturan bezonon (PIV)

## Vankuvera Diservo por beni novan edzduopon

Sabaton 7 oktobro mi havis la honoron esti invitita akolito[2] ĉe Diservo en la anglikana katedralo de Vankuvero, ĉefpreĝejo de la anglikana diocezo[3] New Westminster en publika ĉeesto de ĉ. 100–125 gegastoj kaj familianoj. Celo de la diservo estis por oficiale beni la unuiĝon de samseksa virparo, la interŝanĝon de ringoj kaj votoj, kaj por poste celebri ian 'nuptan meson' laŭ unika liturgio nove aprobita de la episkopo. Ĉefcelebranto estis la katedrala dekano[4], kaj kuncelebrantaj sacerdotoj[5] estis la eksa kaj nuna paroĥestroj de la para (kaj mia!) hejmparoĥo de S:ta Jakobo.

La diocezo New Westminster estas jam monde (fi)fama inter anglikanoj pro sia ĝenerale pli malferma akcepto de samseksemuloj ol kutimas inter ceteraj pli evangelie/protestante orientitaj anglikanoj kaj konservativaj romkatolikoj. Tiu ĉi ceremonio estis jam eble la dekdua tia en la katedralo. La anglikana paroĥo S:ta Jakobo apartenas al la t.n. anglo-katolika frakcio de anglikanismo (kelkaj eĉ dirus, ĉe ĝi estas laŭ sia liturgio pli katolika ol la papo!). Tamen ne miskomprenu – oni nek akceptas nek subtenas tute liberan interseksumadon, sed agnoskas, ke ni ĉiuj estas pekuloj sed same gefiloj de Dio, bezonantaj la dian gracon por vivi laŭregulajn vivojn.

Sekvis la diservon tre agrabla akcepto en la hejmo de la paro.

*Brian*

Legu pri la benservo ĉe http://www.cathedral.vancouver.bc.ca/worship/blessings.htm
Hejmpaĝo de S:ta Jakobo: http://stjames.k1marketing.com/
[2]Preĝeja helpanto, mesoservanto. (PIV)
[3]Katolika aŭ anglikana eklezia distrikto, regata de episkopo. (PIV)
[4]Pastrestro ĉe ĉefpreĝejo.
[5]Pastroj kun rajto disdoni la sakramentojn.

## Seksumado en la islamaj landoj

Angla eldono de la germana semajna gazeto Spiegel enhavis en oktobro artikolon pri pluraj facetoj de la seksa vivo kaj tabuoj en la islama mondo. Aparte interesa estas la konstato, ke la severa socia subpremo de ĉia sekseco kondukas nur al multaj ekscesoj kaj hipokriteco. Bela ekzemplo pri kaŝitaj deziroj donas nova serĉilo 'Google Trends' (tendencoj) ĉe www.google.com/trends kie oni povas nun ricevi rangigitan listigon laŭ urbo,

lando kaj lingvo de serĉintoj pri 'sex'. Sep el la unuaj 10 landoj estas islamaj: el kiuj la plej oftaj serĉintoj estas pakistanoj, sekvate laŭvice de egiptoj, irananoj, marokanoj, indonezianoj, saŭdiaraboj, kaj turkoj (la aliaj ne-islamaj landoj estas: Vjetnamio, Barato/Bharato/Hindio kaj Filipinoj). Laŭlingva serĉo tamen surprize rangigas la anglan nur en la sepan lokon, kie vaste superas la araba en la unua loko. Serĉante 'boy sex' aŭ 'man boy sex' montros, ke la kvar unue listigitaj landoj estas islamaj. (Parenteze – serĉu 'Esperanto':n kaj tie, kaj ankaŭ per la normala Google-serĉilo por vidi, ĉu ni povos iel influi la rezultojn!)

En la islama mondo samseksamo estas pli ol nura tabuo – ĝi estas krimo punata per enprizonigo aŭ eĉ per mortopuno. Religiuloj konsideras ĝin esti ia dekandenca okcidenta monstro kaj kontraŭ la dia ordo, kaj citas Koranajn versojn pri tiu praktiko en antaŭislama Arabujo. En la araba lingvo oni nomas samseksamulojn 'luti' laŭ la nomo de antikva urbo Lut, detruita per dia kolero pro ... nu, divenu vi! El tio sekvas, ke malmultaj gejaj islamanoj eĉ faras la provon akordigi aŭ repacigi sian fidon kun sia seksa orientiĝo. Proparolanto de 'Helem', la unusola gej-lesba asocio en la araba mondo, diras, ke multaj havas pro tio konscienckonflikton. 'Helem', kun sidejo en Libano, la politike kaj sekse plej malferma el la arabaj landoj, estas nek tute leĝa nek leĝe malpermesata organizaĵo. Sed eĉ tie ĝia vivo ne estas tute tranvila, kaj ofte venas protestoj kaj minacaj telefonalvokoj, antaŭ ĉio el la apudgolfaj ŝtatoj. Multaj parolas pri gejoj kvazaŭ ili estus malsanuloj, kiujn necesus aŭ resaniĝi aŭ iel forigi.

*Brian*

Fonto: Sex and Taboos in the Islamic World (2), http://www.spiegel.de/international/spiegel/0,1518,443678,00.html

## Beletra niĉo

*"Princo" ankaŭ ĉiam tre afable permesis publikigon al liaj poemoj, unue prezentitaj en lsg-ano.*



Tago malrapide vekiĝadis. Roza sunfasko je okcidenta flanko de la ĉiela firmamento pligrandiĝadis...
Hodiaŭ matene Dio malfermis pordon de ĉielo, ekvidinte min aldemandis:
– Infano mia, kion hodiaŭ vi deziras?
Mi respondis:
– Sinjoro, mi petas Vin plej kore, prizorgu personojn, kiuj ĵus estas legantoj de la vortoj. Benu ilin kaj ilajn familiojn, geamikojn kaj ĉiujn iliajn agojn, se nur laŭ Via volo. Ili indas Vian zorgon kaj benon, kaj por mi mem ili estas karaj.
L'amo de Dio similas al oceano. Ni scias kie ĝi komenciĝas sed neniam finiĝas.
Anĝeloj vivas, kvankam ofte ili malhavas la flugilojn. Ilin ni nomigas AMIKOJ.

*Ekaŭdinte inter tero kaj ĉielo*
*Princo*